# Díaz-Canel ?eestas la prezenton de Kubo kiel kultura destino



Varadero, maj 4 (RHK) La prezidento de Kubo, Miguel Díaz-Canel, ?eestis ?i-merkredon al la prezento de la insulo kiel kultura destino, okazinta en la kunteksto de la 40-a Internacia Turisma Foiro, FITCuba 2022.

La direktorino de Eventoj de la Ministerio de Kulturo, Lis Cuesta, kaj la televida programestro, Edith Massola, konigis al la publiko la proponojn, kiujn la plej granda insulo de Antiloj proponas en ?i tiu afero, kun preska? du mil agadoj en la tuta lando ?iujare.

?iuj manifesti?oj de la artoj ?eestas en ?i tiu ambicia programo, iuj tre emblemaj kaj rekonitaj en la turisma kampo, kiel la Internacia Baleto-Festivalo, la filmfestivalo kaj la Kariba Festivalo en Santiago de Kubo, diris Cuesta.

La respondeculino komentis, ke preter la ofertoj rilataj al la arto kaj literaturo, progresas en la disvastigo de akademiaj eventoj, ?ar la insulo havas grandan scifonton, kiun ?i aspiras disponigi al vizitantoj kaj inter?an?i kun ili.

?i menciis la gravecon de la Agentejo Paradiso, kreita en 1994 kaj specialigita pri kultura turismo, per kiu eblas aliri tiun ?i varian katalogon de agadoj, kiuj ebligas malkovri Kubon el ?iaj ritmoj, kuirtradicioj kaj kulturo en ?ia pli ri?a signifo.

?i-merkredon FITCuba 2022 gastigis prezentojn de malsamaj agentejoj kaj hotelgrupoj, inkluzive de Gaviota kaj Gran Caribe.

Fonto: PL

# Radio Habana Cuba